



# Komencanto

## Kiel tio komenciĝis

Pri sia esperantistiĝo rakontas Anna Lowenstein, konata esperanto-verkistino; fragmentoj el ŝia nova romano

## Verkoj de niaj legantoj

Someraj poemoj kaj rakontoj Sidorkin en Germanio

## Gramatiko serioze kaj ŝerce

Proverboj por komencantoj  
Pri prefikso "Ek"  
Versajeto "Nia lingvo"

## Aforismoj kaj Humuraĵoj

Amuza rakonto,  
Ŝerca enigmo,  
anekdotoj

## La praktiko


Ŝnura kurso por adapti novulojn al E-kolektivo

## Konkurso

"Enigmoj-2006"

## Korespondu!

korespondpetoj kaj anoncoj



Kirjakova Olga [Orenburg, Rusio]

*Por ne resti komencanto, bone lernu Esperanton!*

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

majo – junio

3 (59)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ. Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Stržnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,  
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 -- 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Céri-  
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,  
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Mi-  
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Brankovič  
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-  
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.  
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-  
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalia** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum,  
Husarlyckeveggen 29, SE -- 24294 Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH --  
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El  
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Vi tenas en la manoj someran numeron de nia revuo.

Por ni ĉiuj somero estas bela tempo kun plej longaj tagoj kaj helaj noktoj, abundo de sunvarmo, bunteco de naturo kaj atendataj someraj allogaĵoj - ferioj, ripozoj, kongresoj...

Jes, kongresoj. Kaj verŝajne iuj el vi jam prepariĝas veturi al Universala kongreso, kiu okazos en bela lando Italio. El Italio ankaŭ estas nuna gasto de nia konstanta rubriko "Kiel tio komenciĝis", konata E-verkistino, aŭtoro de originalaj romanoj - Anna Lowenstein, - homo, kiu dediĉis gravan parton de sia vivo al lingvo Esperanto kaj E-movado. Malgraŭ sia trookupiteco kaj laboro pri la nova romano, ŝi trovis tempon rakonti al niaj legantoj pri tio, kiel ŝi iĝis esperantistino. Laŭ afabla konsento de la aŭtorino fragmentoj el ŝia nova romano por la unua fojo aperas sur paĝoj de nia revuo.

Rubriko "Verkoj de niaj legantoj" ĉi-foje kolektis kaj prezentas al vi poetikajn, lirikajn kaj humurajn verkdediĉojn al somero. Originalaj versaĵetoj de N. Neĉajev kaj prezento de kampaj floroj, tradukita de R.Kudrjavceva, proksimigas nin al somera naturo. Mikronovelo de S.E.Bullo "Apud la rivero, hazarde" transdonas atmosferon de naskiĝanta amosento inter du junaj homoj. Humura rakonto de V.Opletajev pri aventuroj de Sidorkin en Germanio priskribas komikajn situaciojn, kiuj povas okazi al homo, kiu certas, ke li posedas fremdan lingvon, sed ĉe la praktiko okazas, ke... Unuvorte, ni esperas ke la rakonto plaĉos al vi kaj rememorigos konfuzajn kaj amuzajn situaciojn, en kiujn vi eble trafis, vojaĝante somere eksterlande.

Ni daŭrigas publikadon de originalaj gramatikaj lecionoj de Jean'-Luko Tortel, en kiuj li analizas Zamenhofajn proverbojn. Ĉi-foje krom pure gramatikaj momentoj li iomete tuŝas ankaŭ ideajn kaj filozofiajn flankojn de la internacia lingvo. Espereble vi ĝuos poemon "Nia lingvo", kiun donacis al nia revuo jam bone konata al vi poeto Baldur Ragnarsson el Islando.

En rubriko "La praktiko" estas prezentataj elementoj de konata metodo, tiel nomata "ŝnura kurso", kiu povas helpi adapti novulojn al jam funkcianta E-kolektivo. Vian atenton atendas ankaŭ la vicaj taskoj de la konkurso "Enigmo-2006". Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj kaj korespondpetoj troviĝas sur siaj kutimaj lokoj.

Agrablan legadon kaj bonan ripozon al vi! La redakcio ĝojos ricevi materialojn pri viaj someraj vojaĝoj, spertoj kaj impresoj!

## Komencanto

2006 numero 3 // (59) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: [vkud-a](mailto:vkud-a)

rusia tarifo: 180 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

*Vaste konata verkisto de multaj artikoloj en Esperanto, aŭtoro de la romano "La ŝtona urbo" (1999) kaj la libreto "Sukcesa mamnutrado" (1995). Fondinto kaj redaktoro de la feminista revuo "Sekso kaj Egeleco" (1979-1988), redaktanto de la facila parto de junulara revuo "Kontakto". Membro de la Akademio de Esperanto, kaj Cseh-instruisto ĉe la Esperanto-grupo en Romo.*

## Dankon, onklo Julius

La homo, kiun mi devas danki pro mia esperantistiĝo, estas mia praonklo, Julius Löwenstein. Fakte, mi neniam renkontis lin; li mortis antaŭ mia naskiĝo. La nazioj venis al lia hejmo iun matenon tre frue kaj forkondukis lin kiel judon.

Mi aŭdis pri mia praonklo Julius de mia patro, kiu memoris lin kun granda amo. Li estis homo kun multaj intereso, kaj inter tiuj intereso estis Esperanto. La familio loĝis en Nurenburgo, do certe li multe aŭdis pri la lingvo dum la Universala Kongreso de 1923, kiu estis unu el la plej grandaj kongresoj en la historio de la movado. Tial li entuziasmiĝis – sed ĉu li mem lernis la lingvon? Fakte, mi ne scias, ĉu li vere estis esperantisto.

Mi decidis lerni Esperanton, kiam mi havis 13 jarojn. En mia lernejo oni kutime ekstudis la francan en la unua klaso (je 11 jaroj), kaj la latinan en la dua. Por ni anglalingvanoj, la franca prezentis plurajn eksterordinarajn novaĵojn, precipe la konceptojn pri gramatika genro kaj pri verbaj konjugacioj. La angla, same kiel Esperanto, kutime ne havas genrojn, do la instruistino devis klarigi al ni, ke en la franca "libro" estas vira, dum "seĝo" estas ina – tio ŝajnis al ni infanoj tre stranga, kaj ankaŭ iom amuza! Krome la verboj en la angla estas tiel simplaj, ke anglalingvaj infanoj lernas ilin nature kaj ne bezonas studi ilin en la lernejo. Do ni tre surpriziĝis pro la malkovro, ke en la franca estas aparta verbo-finaĵo por ĉiu pronomo.

Kaj krome estis la neregulaj verboj. Ne sufiĉas en la franca, ke ĉiu pronomo havas sian propran finaĵon; ĉe multaj verboj tiuj finaĵoj ne sekvas la regulojn, tiel ke necesas lerni ilin aparte. Post ĉiu leciono de la franca ni iris hejmen kun du aŭ tri novaj verboj, kiujn ni devis lerni parkere. Tial okazis, ke iun vesperon mi demandis min. "Ĉu ne eblus lerni lingvon, kiu ne havas neregulajn verbojn?" Kaj kompreneble mi tuj sciis la respondon, kiun mi jam aŭdis de mia patro: Esperanto.

Mi iris al la publika biblioteko, kaj tie trovis la libron *Teach Yourself Esperanto* ("Instruu al vi mem Esperanton"). Por homo, kiu jam studis la francan kaj la latinan, Esperanto estis evidente tre facila. Mi tralegis la unuajn lecionojn senprobleme, kaj rapide progresis. Fakte, mi eĉ tro rapide progresis: la lingvo estis tiel facila, ke mi ne ĝenis min lerni parkere la novajn vortojn, kiuj aperis en ĉiu ĉapitro. Tial mi ne memoris ilin precize kaj ne povis bone fari la ekzercojn, kiuj troviĝis en la libro. La sekvo estis, ke post sep-ok ĉapitroj mi enuis kaj reportis la libron al la biblioteko.



Sed evidente la intereso restis, ĉar post kelkaj monatoj mi decidis provi denove. Mi re-pruntis la libron, kaj ĉi-foje mi studis ĝin pli serioze, lernante parkere ĉiujn novajn vortojn, same kiel mi farus en la lernejo. Sekve, ĉi-foje mi finis la kurson.

En la fino de la libro aperis la adreso de Brita Esperanto-Asocio. Kvankam mi havis tre malmulte da mono, mi skribis al BEA kaj membriĝis. Mi ankaŭ elektis el ĝia katalogo facilan legolibron kaj la plej malmultekostan vortareton. La libron mi povis legi senprobleme, sed la revuo de BEA estis pli malfacila. Multaj vortoj ne troviĝis en mia malgranda vortaro; mi memoras, ke aparte mistera por mi estis la vorto **samideano**. Mi ne sukcesis kompreni, ke temas pri sam-ide-ano "membro de la sama ideo" (alivorte, esperantisto).

Eĉ pli malfacila estis *Kial ne?* la revuo de Junularo Esperantista Brita, kiu havis tre aventureman lingvo-uzon, absolute ne kompreneblan por komencanto. Mi tamen vidis en ĝi anoncon pri junulara semajnfino proksima al Londono, kaj iom nerve veturis al ĝi. Mi estis nur 15-jara, kaj neniam antaŭe iris sola al tia aranĝo. Kiam mi alvenis, mi miris, ke la plejmultaj de la partoprenantoj havas pli ol 20 jarojn, kaj kelkaj eĉ atingis 30! Al mi, tio tute ne ŝajnis juna! Bonŝance, estis ankaŭ pluraj lernejoj, samaĝaj kiel mi. Mi ĝuis la semajnfinojn, kaj konstatis, ke mi bone komprenas ĉion. Bedaŭrinde, mi estis tro timema por mem provi paroli en Esperanto.

Kvankam mi loĝis en Londono, por viziti la plej proksiman Esperanto-klubon mi devis veturi pli ol unu horon per tri aŭtobusoj. Kaj kiam mi alvenis, mi trovis tute malgrandan grupon da homoj, multe pli aĝaj ol tiuj ĉe la junulara renkontiĝo. Ili ĉiam entuziasme salutis unu la alian en Esperanto – sed post la salutoj ili simple daŭrigis en la angla. Mi ne malkuraĝiĝis, kaj eĉ pluiris dum kelkaj monatoj, sed en la fino mi rezignis, precipe ĉar mi devis prepariĝi por lernejaj ekzamenoj.

Post tio mi fakte rezignis pri Esperanto dum pluraj jaroj. Sed la semo restis kaŝita kaj de tempo al tempo donis etan vivosignon. Mia esperantista vivo vere komenciĝis kiam mi loĝis dum kelkaj jaroj en Israelo, kie mi vizitis la lokan klubon en Tel-Avivo. Tie mi trovis grandan kaj vigan grupon, kie la homoj vere paroladis inter si en Esperanto, kaj kun tre aktiva junulara sekcio. Inter ili mi renkontis junulinon, kiu estas ankoraŭ unu el miaj plej bonaj amikinoj, kaj estis ŝi, kiu montris al mi malgrandan anoncon en revuo *Esperanto* pri volontula posteno en la Centra Oficejo de UEA (Universala Esperanto-Asocio) en Roterdamo.

Tiel, dek tri jarojn post kiam mi unue serĉis la libron de Esperanto en la loka biblioteko, mi fariĝis aktiva en la Esperanto-movado. Kion pensus mia pranonklo Julius, se li sciis, ke lia pranevino edziniĝis al esperantisto, parolas la lingvon kun sia familio, kaj mem verkas en ĝi librojn kaj artikolojn?

*Karaj legantoj!*

*Por publikigo en nia revuo Anna Lowenstein afable disponigis fragmentojn el sia nova (ankoraŭ ne aperinta) romano "Morto de artisto". Krom plezuro de legado, komentantaj aŭtoroj povas ricevi ankaŭ utilan sperton kiel verki bonstilan kaj facile legeblan tekston en Esperanto. Ni esperas, ke tra lego de la fragmentoj vokos en vi deziron nepre legi la romanon post ĝia apero libroforme.*

*la red.*

**Anna Lowenstein**

### (Enkonduko al la libro)

La Sunĉambro estas mia preferata loko en la vilao. Vitaliso ĉiam ŝercas pri tio. Ŝi trovas tion amuza, ke dediĉinte tiel grandajn sumojn por dekori la ceteran parton de la domo, mi tamen elektas sidi ĉi tie, en ĉi tiu malgranda, simpla ĉambro kun la banalaj



Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]

ĉambro kun la banalaj murpentraĵoj kaj la eluzita divano postlasita de Montano. Sed ĝi estas tuj apud la forno, do ĝi restas varma eĉ dumvintre, kaj kiam la fenestrokovriloj estas flankenŝovitaj mi havas vastan elrigardon super la tuta valo.

Loĝante ĉi tie de tiom da jaroj – ĉu dek tri? dek kvar? – mi apenaŭ povas kredi, ke ĉion ĉi oni povus forpreni de mi. Nun kiam mi timas perdi ĝin, mi ekkomprenas ĝis kia grado mi ligiĝis al la loko.

Sed mi vidas nun, ke tiu risko ĉiam ekzistis. Mi similis homon, kiu marŝas laŭ la rando de alta krutaĵo. Mi ne volis rigardi funden al la maro, kiu ŝaŭmadis malsupre ĉirkaŭ la rokoj, nek fronti la eblecon, ke iam la grundo povus fordiseriĝi sub miaj piedoj. Ĉar la fakto estas ke la tuto – mia prospero, mia pozicio, mia bonŝanco – ĉio dependis de unu homo.

Li estis fama pro siaj elspezemo kaj donacemo, pro siaj pasioj, pro sia entuziasmo dividi siajn riĉaĵojn kun la publiko per distraĵoj kaj spektakloj. Li estis amata pro sia grandiozecon – kaj certe grandiozecon oni atendis, eĉ postulis, de persono en lia pozicio.

Multaj homoj rifuzas kredi, eĉ nun, ke li mortis. Ili konsolas sin per onidiroj, ke iu vidis lin, eble en Egiptujo, aŭ en Partujo, aŭ plej verŝajne en Grekujo, lia amata Grekujo, la lando kie en la tuta imperio oni memoras lin kun plej granda plezuro kaj kie oni plej sincere funebris lian morton. Sed tiaj espero povas trafi nur seniluziigon – mi estas la homo, kiu plej bone scias tion.

Mi foje demandas min, kion mi farus, se pro ia nerealigebla miraklo li aperus ĉe mia pordo, fuĝanto, vestita en la sama maldelikata, malhela tuniko en kiu mi laste vidis lin. Ĉu mi pretus forgesi la misagojn kiujn li faris, la amikojn kiujn li detruis?

Jes, mi memoras ĉion ĉi, kaj tamen mi ne povus rifuzi al li pardonon. Al li mi tro multe ŝuldas.

Li estis la homo, kiu faris min tia, kia mi estas.

\*\*\*

*(El la dua ĉapitro. La rakontanto estas Prokulpio, 17-jara komika aktoro. Nerono kaj Oto estas la estontaj romiaj imperiestroj, sed en ĉi tiu ĉapitro ili estas adoleskuloj.)*

Komencis mallumiĝi kiam ni foriris, kaj la du sklavoj iris antaŭe kun torĉoj. Forlasinte la homamasojn kaj la lumojn de la bordela kvartalo, mi eksentis maltrankvilon, kiel ĉiam okazas, kiam mi devas marŝi malfrue tra la urbo. La stratoj en ĉi tiu kvartalo estis relative silentaj kaj la domoj jam estis ŝlositaj kontraŭ la nokto. Certe estis preferinde iri kiel membro de grandeta grupo, aliflanke mi timis, ke kun niaj sklavoj kaj torĉoj ni povus alvoki atenton nedeziratan.

Ni preskaŭ reatingis nian loĝejon, kiam realiĝis miaj timoj. Du viroj subite ekpaŝis antaŭ nin kaj demandis kun malica rikano, kien ni supozas iri je ĉi tia horo de la nokto. 'Lasu nin pasi,' diris la sklavo Doriforo per aŭtoritata tono.

'Kial la hasto?' unu el ili diris. 'Ni vidu, kion vi alportis.' Li perforte kaptis la torĉon el la mano de Epafrodito kaj ŝovis ĝin kontraŭ Nerono. 'Belan mantelon vi havas. Kie vi trovis ĝin?'

'Lasu nin preteriri,' Oto diris per danĝere milda voĉo. 'Aŭ vi bedaŭros.'

'Kial tiom rapidi? Mi volas rigardi la ringojn de via amiko. Ĉu ili estas veraj? Mi ne portus tian manplenon tra la urbo, se mi estus vi. Oni ne volus, ke iu ŝtelu ilin.' Li eligis malbelan ridaĉon kaj laŭtigis sian voĉon. 'He, Venusto! Venusto! Jen ĉi tie ulo reportas tiujn ringojn, kiujn vi perdis antaŭ kelkaj tagoj.' Malantaŭ niaj dorsoj, du pliaj viroj paŝis el antaŭpordo. Oto fulme turniĝis, kaj subite li tenis en la mano glavon. 'Rapide, Nerono! Eligu vian glavon!' Mallerte Nerono tiris glavon de sub sia mantelo. Lia mano tremis.

Niaj atakantoj ne atendis eĉ tian malkonvinkan kontraŭstaron. Ili hezitis. 'Vi ne estas soldatoj, ĉu ne?' unu demandis. 'Ĉu vi neniam aŭdis pri la punoj, se oni portas armilojn tra la urbo?' Subite Nerono eligis krimon kaj impetis kontraŭ unu el la viroj, dum Oto kun preta glavo celis alian. Mi aŭdis akran krimon apude, kaj Primo falis teren tenante sian kapon. Preskaŭ tuj la viroj fuĝis, forlasante sian kunulon, kiu tordiĝis tike sur la grundo en malhela flako rapide kreskanta.

'Ĉu vi estas en ordo, Primo?' mi demandis maltrankvile.

Li levis sin sur la manoj kaj genuoj. 'Mi volas vomii,' li anoncis, kaj tuj faris tion abunde.

Oto rapidis al li kun torĉo kaj ekzamenis lian kapon. 'Li estos en ordo. Verŝajne ili batis lin surkape per bastono aŭ simile. Jen, Doriforo, Epafrodito, helpu lin ekstari. Prokulpio, vi prenu la torĉon.'

'Kio pri li?' mi demandis, indikante nian atakinton, kiu ankoraŭ kuŝis raspe spirante ĉe niaj piedoj. 'Kio pri li? Liaj amikoj trovos lin morgaŭ matene.'

Tre ŝokite, ni daŭrigis laŭ la vojo al nia loĝejo, kie Oto kaj Nerono atendis ekstere en la strato kun Epafrodito, dum mi kaj Doriforo helpis Primon supren laŭ tri ŝtuparoj al nia ĉambro. Montriĝis, ke Sekundo enŝlosis sin, kaj ni devis tamburi ĉe la pordo por lin veki.

Viro malfermis la najbaran pordon. 'Kion je la nomo de Herkulo vi faraĉas, per tia bruego je ĉi tiu horo nokta! Vi aktoroj – la dioj tiru vin malsupren al la Infero!'

'Ho, fermu la faŭkon!' mi kriegis.

Sekundo malfermis la pordon. 'Kion vi faris? Kio okazis al Primo?'

Doriforo kaj mi puŝis preter lin kaj tiris Primon al la lito. 'La dioj rekompencu vin pro via helpo,' mi diris fuŝe, dum mi demandis min ĉu mi ne devus doni al li trinkomon. Sed monon mi apenaŭ havis, kaj cetere Doriforo ne aspektis kiel tia homo, kia volonte akceptus tian ĝentilajn de ulo tiel malestiminda kiel komika aktoro. Mi estis certa, ke eĉ se li estas nura sklavo, li estas multe pli riĉa ol mi.



*Legante la libron* Timur Halilov [Jekaterinburg]

Nikolaj Neĉajev [Irkutsk, Rusio]

## Somero

Somero malavara  
per verdo arbojn volvas.  
Suneto flama kara  
per floroj teron kovras.  
Venteto freŝa blovas  
aromo nazon tuŝas.  
La mano fragon trovas  
en ombro bero kuŝas.

### Juna junio

Ni junas en juna juni'  
revenas knabaĝo al ni.  
Esperas feliĉi la kor'  
en flora somera maĵor'.  
La ondon ektuŝas la mev'  
animen penetras la rev'.

\*\*\*

Esperantigis el la rusa **Kudrjavceva Raja** [Jekaterinburg, Rusio]

## Komenco de somero

Junio — estas plej longaj tagoj kaj plej kurtaj noktoj, estas varmo kaj lumo.

Junio estas monato de kreskantaj herboj: buntas herbejoj, arbaraj kampetoj kaj riveraj bordoj. Ĉu povas esti pli belaj lokoj ol tiuj ĉi: pro la verdaj herboj, pro la blankaj kamomiloj, pro la bluvioletaj kampanulfloroj kaj pro la bluetaj miozotoj!

Nenio sur la tero estas pli belega kaj fajna, ol la floroj. Por homoj floroj ĉiam estis etalono de harmonio. Oni ĉiam kredis en ilian vivigan kaj eĉ magian forton.

## Miozoto

*(Tio estas scienca nomo de la floro, sed ĝi havas ankaŭ alian, popolan nomon — Neforgesumino kaj ligitajn kun ĝi popolajn mitojn)*

Apud rojetoj kaj marĉetoj, arbaraj riveretoj kaj simple apud humidaj arbaraj lokoj kreskas unu el la plej belaj kaj teneraj floroj — Miozoto. Multe da versajetoj kaj popolaj diroj estas verkitaj pri ĝi.

Foje la Diino Flora, bela kiel la floroj mem, malsupreniĝis sur la Teron. Ekrigardis la Diino ĉirkaŭe - ĉio bonordas - en la arbaro birdoj kantas, la kampetoj per floroj beliga. Komencis Flora disdoni nomojn al la floroj, donacis al ĉiuj kaj jam volis foriri, kiam subite ekaŭdis mallaŭtan voĉeton, kiu sonis de la rojeto: "Bonvolu doni ankaŭ al mi nomon, Flora". La Diino apenaŭ trovis inter la densa herbaro la etan bluetan floron. "Bone, - diris Flora, - vi estu Neforgesumino". Kaj ŝi donis al la ĉiela floreto ne nur nomon, sed donacis al ĝi miraklan forton refreŝigi memoron al tiuj homoj, kiuj komencos forgesadi siajn amikojn kaj proksimulojn, kaj lokojn, kie ili naskiĝis.

Oni diras, ke "Neforgesumino" la tutan mondon tenas en si: en ĝia centro estas suno el flavaj stamenoj, kaj ĉirkaŭe - ĉielo el bluetaj petaloj.

*Karaj legantoj! Nia konstanta rubriko prezentas ĉi-foje originalajn kaj tradukitajn verkojn, dediĉitajn al bela kaj ĝuinda sezono — somero. Dume la somero daŭras — rapide sendi ankaŭ viajn verkdediĉojn al ĝi!*

la red.



## Kampanulo

*(rusa popola nomo "sonorilet'-floro")*

Komence de junio sur herbejoj kaj kampetoj disfloras kampanuloj aŭ sonoriletfloroj. Ilin konas ĉiuj, ĉar ilin ne eblas miskoni. La kampanuloj — estas tre afablaj floroj, eĉ pro la facila venteto la floretoj balanciĝas sur siaj trunketoj, karese sonoraras, kvazaŭ salutas nin. Se esti tre atenta kaj sentema, eblas ekaŭdi tiun sonoron. Per siaj sonoroj la Sonorilet-floroj glorigas sunon kaj ĉielon, teron kaj arbaron.

Temperaturo ene de la floro de la kampanulo estas pli alta, ol temperaturo de ĉirkaŭa aero je 2-3 gradoj, kaj tial skaraboj, araneoj kaj muŝoj tre ŝatas tiujn florojn ne nur pro dolĉa nektaro, sed ankaŭ pro tio, ke en ili ĉiam eblas kaŝi sin kontraŭ pluvo kaj vento, ke tie estas ĉiam varme kaj seke. Al la belulinoj-papilioj ŝajnas, ke tio renversigis la ĉielo. La Sonorilet-floroj al ĉies ĝojo floras la tutan someron, ĝis aŭtuno.

Beleco de la Sonorilet-floroj ravis komponistojn, pentristojn kaj poetojn.

Ĝi helpis al la homoj inventi sonorilon. Estas konate, ke en 1500 jaro en Italio oni decidis fari floron de kampanulo el kupro.

La kampanulo havas maldikan trunkon. Tiu kreskaĵo estas tre sentema kaj ĝiaj deŝiritaj floroj rapide velkas. Tial ne necesas pluki tiujn sorĉajn florojn, kresku ili por rideti al la suno kaj vento, kaj portu ĝojon al ni ĉiuj.

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

## Apud la rivero, hazarde

*Mikronovelo originala*

### 1

Kiam regis surtere serenaj someraj vesperoj, sinjoro Marko tre ŝatis promenadi laŭ la padoj apud la rivero. Ĉirkaŭe regis paco kaj trankvilo... Kantis birdoj, kaŝitaj sub la folioj de longaj branĉoj.

Li rigardis la strekojn ruĝajn, flavajn, lazurajn, kiuj naskiĝis en la ĉielo. Li rememoris pasintajn feliĉajn tagojn, kiam li estis kune kun karaj gepartoj... (nuntempe li estas tute sola. Ili ne plu vivas).

Tamen, la malĝojaj pensoj ne malhelpis al Marko konsideri tiun ĉi belan momenton de la tago. Jes... Li estis modesta oficisto, ankoraŭ sufiĉe juna kaj sufiĉe kontenta pro sia laboro.

Li estis bibliotekisto, lia laboro estis pruntedoni librojn al la legantoj kaj poste, kiam finiĝis laborhoroj de la biblioteko, remeti zorge la volumojn sur la librobretarojn. Tio ĉi estis tuta lia rolo.

Tamen iufoje, kiam en la biblioteko estis malmultaj legantoj, li povis iom ion legi. Tiel, iom post iom, sinjoro Marko trovis komunajn temojn por paroloj kun la legantoj. Precipe al li plaĉis paroli kun sinjorino Liala, kiu ankaŭ volonte parolis kun li. Li estis afabla kaj bonedukita junulo, bone parolanta, sed pli bone aŭskultanta.

Senintence, la gejunuloj komencis senti amajn sentojn unu al la alia... sed neniu el du kuraĝis tion konfesi.

Hazarde okazas tio, kio frue aŭ malfrue, tamen devis okazi...

### 2

Estis unu el tiuj trankvilaj vesperoj kaj sinjoro Marko kutime marŝis sur la padoj laŭ la rivero, sur kies pura akvo rebrilis krepuskaj sunradioj.

Apud la bordoj, en diversaj lokoj estis blankaj ŝtonoj, sur kiuj oni povis eksidi kaj paŭzi.

Sinjoro Marko sidis sur ŝtono, kiam li vidis alveni sinjorinon Liala. Ŝi surmetis belan ĉemizeton kun longa jupo, kiu ŝajnis flugeti ĉirkaŭ ŝi.

Sinjoro Marko neniam vidis tiel belan virinon... Li restis senspira dum Liala lin salutis:

— Bonan vesperon... kion vi faras ĉi tie tute sola, sinjoro Marko?

Li respondis malrapide, fiksrigardante ŝin:

— Bonan vesperon!

Ŝi trankvile eksidis apud li.

Sinjoro Marko prenis tutan sian kuraĝon kaj komencis paroli pri iu temo... "Turandot" (pri kiu antaŭnelonge li legis historion) al li ŝajnis bona teatra temo, pri kiu decidis interparoli kun bela junulino...

Liala ridetis pro lia embaraso kaj diris multajn interesajn aferojn.

— Mi ne komprenas, - ŝi diris, - kial bela, afabla princino trovis tian krudan manieron por nei sian manon al edziniĝo...

— Vere, - li enpense respondis, - kiu ne solvis enigmojn, kiujn Turandot proponis, pagis per sia vivo... Kaj multaj princoj mortis... Fine, tamen troviĝis iu, kiu solvis enigmojn kaj venkis per amo la junulinon, vere viglan, sed heziteman. "Estis bela edziĝo"

### 3

Sinjorino Liala atente aŭskultis tiajn lastajn vortojn, kiujn Marko senintence diris kun forta akcento.

— La historio de Turandot multe trafis en vian menson kaj en vian koron, - diris afable Liala.

— Vere. Mi pri tio ankoraŭ pensas.

— Eble vi havas enigmon, kiun vi ankoraŭ ne solvis? - duondiris Liala per dorlota voĉo.

— Ne necesas esti granda princino, - mallauĉe respondis Marko. - Kia ajn junulino povas esti kruela per amo...

— Ho, kion vi diras... Marko...

Liala senvole kore sinkonfesis...

Marko rigardis ŝiajn belajn okulojn... en ili li legis amon...

Jam la vespero foriris, venis unuaj noktaj ombroj... Liala kaj Marko man-en-mane malrapide revenis al la silenta malluma urbeto...

\*\*\*




por la paĝoj pentris Izmajlova Luiza, [Kuzneck, Rusio]

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

# Sidorkin en Germanio

## humura rakonto



bildojn sur la paĝoj desegnis Aleksej Ŝulepin [Osa, Rusio]

Tian febran entuziasmon, kun kia Sidorkin prepariĝis al sia aspirata vojaĝo en Germanion, ne eblas priskribi nur per kelkaj vortoj, ĉar tio estis fundamentaj okupoj ne sole nur pri turista ekipaĵo sed plejparte ili koncernis studadon de la germanaj historio kaj geografio, moroj kaj kutimoj, perfektigon en la lingvo. Por tiu celo li luprenis en la biblioteko la plej modernajn lernolibrojn kaj leksikonojn en brilantaj superkovriloj, kiuj malfermis al Sidorkin la pordon en la mondon de malfacilaj konjugacioj kaj deklinacioj. Vespere oni povis nun ofte vidi lin sidi ĉe la tablo kaj sensone movi la lipojn ripetante ion el gramatiko aŭ leksiko.

En infanaĝo Sidorkin estis en sia vilaĝo la plej bona lernanto de la germana lingvo. Li opiniis ĉerpi siajn sciojn el fidindaj fontoj, ĉar la instruistino – antikva arkaika avineto – loĝis

iam en la pasinta jarcento kiel eta knabino dum du aŭ tri jaroj en Germanio, kaj ĉi tiu fakto certigis lin pri senduba aŭtoritato de la lingvo-perantino, kiu cetere iom balbutis germane, sed pro la maljuna senileco forgesis ĉiujn didaktikajn principojn krom la taskoj traduki tekstojn buŝe kaj skribe. Sidorkin faris tion plej lerte, ĉar al li plaĉis nerapida fosado en la vortaroj kaj malkovro de novaj vortoj, kiujn li tuj forgesadis kiel senbezonaĵojn elementojn post la kompreno de la frazo. Tiel, perfekte poentigita pri la germana lingvo en la abiturienta ekzameno, sed kun minimume enkapigitaj scioj, kun bona atesto li forlasis la lernejon.

Dum la venonta vojaĝo lin atendis aventuroj kaj travivaĵoj el inter kiuj plej loge estis dorlotata interkompreniĝo kun germanoj sen interpretisto, kaj Sidorkin memfide kredis siajn kapablojn fari tion almenaŭ kun

sepdek – okdek procentoj da relativa sukceso. Sed la abisman relativecon de siaj pseŭdokonoj li spertis tuj post kiam li ĝoje ĝisrevidis al stevardino kaj kun la koro, forte batanta pro la emocioj, malsupreniris la aviadilan eskalon. La anoncoj, kiujn li aŭdis en la atendejo, diritaj per agrable modulita virina voĉo, konsternis lin per sia totala nedivenebleco. Sidorkin komprenis, ke la komunikoj sonas germanlingve, ĉar en Germanio, sed lia menso ne povis digesti la enhavon kaj des pli deĉifri ĝin. Li estis konfuzita ĝis neimagebla grado, sed kiel neniam malesperanta optimisto li klarigis la kaŭzon de la konfuzo tutsimple per radio, kiu aŭdigas ne vivan voĉon sed ĝian teknike modifitan varianton. “Espereble la senpera kontakto estos pli sukcesa”, – rezonis li kaj direktis sin al monŝanĝejo por ŝanĝi ĉekojn je eŭropaj devizoj.



“Halo!” – Salutis li ap-  
lombe kasistinon. “Ĉu vi parolas  
germane?” La kasistino, ku-  
tumiĝinta al absurdaj kaj ridindaj  
demandoj de diverslandaj klientoj,  
nur milde ridetis al li kaj res-  
pondis jese: “Memkompreneble,  
sinjoro”. Sidorkin, entuziasmigita  
de la sukcesa kontakto, por mon-  
tri sian familieran sintenon al la  
germana lingvo, tuj uzis anstataŭ  
la ordinara vorto “mono” iun  
komunuzan vorteton trovitan en  
la stokoj de la leĝera vortoprovizo  
kaj kiu tre plaĉis al li. La mieno de  
la kasistino abrupte ŝanĝiĝis  
kvazaŭ ŝi manĝus citronon kaj,  
doninte al Sidorkin monbiletojn,  
ŝi demandis lin kun pardonpeto  
duonvoĉe: “Ĉu vi revenas el la  
prizono, sinjoro?” Sidorkin elor-  
bitiĝis la okulojn. “Kial demandas  
vi tion? Mi venas el Rusio!” – res-  
pondis li indignite. “Ĉar vi uzas  
vortojn, kiuj cirkulas en la krimula  
medio...” Ŝokita de la nova em-  
baraso, Sidorkin paralizigis por  
momento kaj poste konkludis, ke  
la leksikonoj en brilantaj super-  
kovriloj ne lojale klarigas la vor-  
tojn kaj li devas esti plu tre  
akurata pri siaj paroloj, se li ne  
deziras, ke oni konsideru lin fri-  
pono.

Sed ankaŭ en ordinaraj  
situacioj al li ofte ne sufiĉis vortoj  
por esprimi plej trafe nuancojn de  
siaj petoj kaj demandoj. Iufoje,  
promenante tuttage tra la urbo en  
novaj ŝuoj, Sidorkin havigis al si  
kalon sur la kalkano, kiu senteble  
doloris lin, kaj tiu doloro venigis  
lin vespere en apotekon por peti  
iun sedativan ŝmiraĵon. La olda  
oficisto enmanigis al li tubeton de  
kuracajo kun akcesora instrukcio.  
Leginte en la hotelĉambro la in-  
strukcion, Sidorkin konstatis, ke  
la kontakto denove missukcesis,  
ĉar li aĉetis kuracilon kontraŭ la  
verukoj. Reveninte en la apote-  
kon, li, sen scii bezonatajn vor-  
tojn, tuj demetis la ŝuon kaj pan-

tomime kapriolante antaŭ la teko  
komprenigis sian plagon al la  
oldulo, kiu ĝoje ridetante, kun  
afabla sinklino, etendis al li novan  
tubeton.

Iun tagon li certiĝis, ke  
kunparolantoj ofte ne komprenas  
lin pro la fuŝa prononco al kiu li  
alkutimiĝis en la lernejo. Jes, Si-  
dorkin konsciis, ke lia prononco  
ne estas modela, sed efektive ĝi  
estis germana formo aŭdigata en  
neimageble rusa akĉenta maniero.  
Afable babilante kun iu viro en la  
strata kafejo, Sidorkin interesiĝis  
pri liaj infanoj. Sed la viro, ansta-  
taŭ ol respondi la ĝentilan de-  
mandon de Sidorkin, subite tuŝis  
per la mano sian mentonon kaj  
mire rigardis lin ne komprenante  
la demandon. La kompatinda  
poligloto nur poste eksciis, ke la  
germanoj aspiracie prononcas la  
sonorajn konsonantojn fine de la  
vortoj, kaj ĉar Sidorkin tion ne fa-  
ris, li miksis en la demando du  
vortojn: infano kaj mentono. Sed  
ankaŭ same tiel li miksis la adjek-  
tivojn malvarma kaj kalva.

“Ho, kiel malfacile estas  
komunikiĝi en la etna lingvo” –  
pensis Sidorkin dum rea flugo si-  
dante en komforta aviadila fotelo.  
“Kiom da fortoj necesas dediĉi al


lingvaj okupoj por kompreni faj-  
najn nuancojn el fremda lingvo”  
Kaj li rememoris ĉiujn konfuzojn  
kaj miskomprenojn, kiujn li  
abunde spertis dum sia restado en  
Germanio. Foje ili estis ridindaj,  
foje ne tre agrablaj, ĉar ili mal-  
kovris la aŭtoron el vidpunkto de  
senpripense folaj sintenoj. Iun  
tagon dum la busveturo Sidorkin  
havis naŭzon. Li sciigis ŝoforon  
pri la problemo asertante, ke li  
sentas sin iom strange. Sed mal-  
graŭ lia pala aspekto la ĉirkaŭan-  
toj ruze ridetis kaj skuis la kapojn,  
ĉar tiel strange en la germana  
lingvo povas farti nur gravedaj  
virinoj...

Kaj tamen Sidorkin estis bra-  
vulo. Li havis nenian timon babi-  
lante en la lingvo stumbliganta lin  
ĉiupaŝe, li estis ĝoja pri kontaktoj,  
kaj dum ĉi tiu vojaĝo li faris mul-  
tajn malkovrojn kaj konkludojn,  
el inter kiuj la plej utila estis tiu  
pri la valoroj de interhoma ko-  
muniĝo. Oni povas tre mallerte  
formuli siajn ideojn en la fremda  
lingvo, sed ĉiufoje pli gravas la  
sincera deziro esti amiko de la  
popolo, kiu vin gastigas en sia  
hejmo.

\*\*\*



*Al ĉies plezuro ni daŭrigas publikadon de originalaj kaj spritaj lecionoj de Johan'-Luko Tortel, kiu proponas, legante vastekonatajn Zamenhofajn proverbojn kaj analizante ilin, samtempe "distre viziti" gramatikon kaj foje historion de nia lingvo.*



### Detruita ĝis la fundo de l' fundamento (322)

Fundamento estas soklo, fortika plat-aĵo, sur kiu oni konstruas ion: domon, lum-turon, pontan ark-aĵon, ktp; ĝi ankaŭ povas image esti la bazo de ideo, de filozofio, de politiko kaj de Esperanto! Nu, kial de lingvo?

Dekon da jaroj antaŭ nia Esperanto aperis alia inter-lingvo, nomita Volapuk, de Germana prelato Schleyer. Konsider-inda verko, ĝi havis efikan gramatikon, sed la vortaro estis vere malfacile memor-ebla:

### Ĝi estas por mi Volapukaĵo (691) (Pri afero nekomprenebla).

Tamen ĝia ĉefa mal-kvalito estis pli kaŝita: Schleyer prezentis ĝin kiel tutan donacon, kvazaŭ kun rubanda banto ĉirkaŭ la pako: prenu aŭ lasu! Neniu evoluo aŭ ŝanĝo komence ebl-is sen lia konsento.

Johan'-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

## Proverboj por komencantoj

Male Zamenhof tuj komprenis, ke sola homo ne povas regi lingvon; li sin nomis nur: "iniciatoro", lanĉ-into de Esperanto, komprenante, ke lingvo sen-halte bezonas novajn vortojn, esprim-evoluon, eble eĉ parolajn aŭ skribajn ŝanĝ-etojn. Li do jam en la unua broŝuro {la Unua Libro, kiel oni nun nomas ĝin} mal-fiere petis rimarkojn, konsilojn, opiniojn pri sia kre-aĵo. Al homoj prudente pri-pens-antaj, estis bona ideo; al kelkaj mal-saĝaj mani-uloj, tio estis malfermi la skatolon de Pandoro. El-falis lavango da kritikoj, da sen-nuancaj "pli-bon-igoj", da preskaŭ ordonoj. Li sentis la danĝer-egon: se Esperanto restos sen-mova, ĝi glaci-iĝos kaj mortos; se ĝi senhalte ŝanĝ-iĝos, la publiko pensos: "ĝi interesos nin kiam estos fiksa!" kaj de-tornos sin. Kiel samtempe evolui kaj tamen eviti skismon? Ĉu ni mem kapablus trovi?

Jen lia genia invent-aĵo: unue li kun-metis siajn unuajn lernolibrojn en Fundamenton, nepre ne-tuŝ-eblan bazon; neniu rajtos fari eĉ plej etan ŝanĝon en ĝi; due, li tamen konsentis al apero de novaĵoj, sed paralele al la baz-aĵoj, neniam for-puŝe al ili. Tiel oni povas ekzemple nun diri, ke oni vojaĝas "kun bagaĝo en trajna kupeo al Svisio", sed oni rajtas, kiel antaŭ unu jarcento, ankaŭ diri: "kun pak-aĵo en vagon-ara vetur-il-ero al Svisujo": tio restas komprenebla kaj ĝusta.

Simple kaj efike kiel la ovo de Kolumbo, ĉu ne?

Kiel fine danki la Zamenhofan el-turn-iĝ-emon? Ĉu per:

**Kiu kapon posedas, kombilon jam trovos (1016)**

Eble ne, ĉar da haroj li ne havis multe! Ni preferu:

**Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro (1907)**

La unua geni-aĵo de Zamenhof estis la nasko de Esperanto. La dua, la aranĝo de la Fundamento; tio estis kvazaŭ vakcinado al la bebo Esperanto: ĝi cert-igis venontan vivon sen mort-igaj malsanoj. Kio pri la tria geniaĵo? Por kompreni, ni temp-ete lasu la Proverbaron favore al du versoj de la sesa strofo de fama poemo lia, "Preĝo sub la verda standardo":

**Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj  
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.**

Zamenhof pensis, ke du aferoj kreas popolojn (kaj sam-tempe apart-igas ilin): lingvo kaj religio. Lingvo, kompreneble. Sed religio? Ĉar religio vole-nevole influas, eĉ ne konscie, pri edukado, sin-teno en la vivo, sociaj ideoj, politiko... Por kun-igi la hom-aron, sam-tempe respektante la malsamajn popolojn, Zamenhof kreis komunan lingvon, ebl-ig-antan inter-rilatojn ĉe egal-eca nivelo. Sed pri religio? Li skribis, ke ĉiu religio en-havas du partojn.

La interna parto, esenca, similas en ĉiuj religioj:

1) ekzistas mistera forto reganta la mondon (oni laŭplaĉe nomu ĝin Dio, Naturo... ne gravas la nomo);

2) ĉiu homo havas konsciencon (donaco de Dio, de Naturo...), kiu ebl-igas moralan konduton (facila gvid-ilo estas: ne faru al aliaj tion, kion vi ne ŝatus por vi mem: penso unue atribui-ta al Hillel, pratempa juda saĝulo).

La ekstera parto (rakontoj, ri-  
toj, manĝoj, festoj, malper-  
mesoj...) estas krom-ajoj, al-  
donitaj de la eklezioj, sed ne de  
Dio; do aferoj ne-esencaj, modif-  
eblaj, laŭ-bezone ŝanĝ-eblaj:

Maro ĉiujn riverojn ricevas  
kaj tamen ne kreas (1500)

Ĉar la grava afero, la interna,  
funde komunas al ĉiuj religioj,  
ĉiuj homoj (eĉ ateistoj) do tre fa-  
cile povas kun-frati sur tiu bazo:

Preĝu al la Eternulo, ne al Lia  
sanktulo  
(2079)

konservante la eksteran par-  
ton nur inter sam-religi-anoj, sed  
adoptante novajn sintenojn inter  
mal-sam-religi-anoj. Tiel, ĉiuj re-  
ligioj, eĉ de minoritatoj, estos just-  
ece respektataj, kaj malsamaj re-  
ligi-anoj egal-nivele inter-rilatos.  
(Tute same kiel pri Esperanto ri-  
late al lingvoj!)

Bedaŭr-inde la unua mond-  
milito bremsis la Zamenhofan las-  
tan agadon kaj lia morto ne lasis al  
li tempon star-igi tiun super-  
nacian popolon, uzontan la saman  
lingvon, Esperanto, kaj la saman  
religion, kiun li nomis homaran-  
ismo (komence hilel-ismo).

Ni rimarku, ke en liaj tri geni-  
ajoj aperas simila spirito: unue de-  
tala prezentado de grava problemo  
ŝajne ne-trans-ir-ebla; poste pre-  
ter-paso per uzo de pli alta, pli no-  
bla pens-maniero, kun tamen kon-  
servado de la antaŭ-ajoj.

Tio estas trajto Zamenhofa ne  
sufiĉe konsiderata. Oni laŭdas  
liajn kapablojn kiel oratoro, poeto,  
tradukisto... sed oni forgesas lian  
talenton de vera socia filozofo en  
la religia kampo. Ni kviete, atent-  
eme kaj sen-apriore legu liajn tek-  
stojn pri hilel-ismo kaj hom-aran-  
ismo: ni miros pri la ĝust-eco kaj  
aktual-eco de granda pli-parto el  
liaj tiam-aj pensoj de antaŭ unu  
jar-cento.

Ĝis revido, tamen antaŭ unu  
jarcento!

Johan-Luko



Prefikso **ek-** estas uzebla kun verbaj radikoj, ne influante ilian karak-  
teron, indikas komencon de ago, subitan aŭ mallongedaŭran agon.

Ekzemple:

*Post la enlitiĝo mi tuj ekdormis.*

*Tion aŭdinte li ekridis.*

*Ni ekiru jam!*

*Fine ni ekvidis la turojn de la urbo.*

*Nun mi ekkomprenas la aferon!*

*La lumo ekbriletis kaj malaperis.*

Ofte **ek-** anstataŭas la pli longan **komenci**. Ekzemple:

*Mi eklernis librotenadon = Mi komencis lerni librotenadon.*

Kelkaj uzas **ek-** ankaŭ kun prepozicio **de**. Ekzemple:

*Ekde hieraŭ mi estis sola.*

Pli ofte en tia okazo estas uzata tamen *depost* aŭ la simpla *de*: *depost hi-  
eraŭ, de hieraŭ.*

En tiu kazo, se oni konsideras ne la finon de la tempodaŭro, sed ĝian  
komencon, oni uzu **ekde**:

*Ekde la reĝeco de Ludoviko la 14-a...* signifas de post la jaro 1643.

*Depost la reĝeco de Ludoviko la 14-a...* signifas de post la jaro 1715.

Maloftte **ek-** estas uzata eĉ kiel memstara verbo:

*Ni eku!* = *Ni komencu!*

Kaj ankaŭ kiel speco de interjekcio ĝi estas kelkfoje uzata:

*Ek al laboro! Ek al la studo!*

*Jen ankoraŭ unu tre bela versaĵo, verkita de monde konata esperanto-poeto el Is-  
lando Baldur Ragnarsson kaj afable proponita por legantoj de "K".*

## Nia lingvo

Baldur Ragnarsson [Rejkjavik, Islando]

En nia lingvo vibras luma fort',  
por ĉia penso pretas klara vort',  
por ĉia eto, ĉia granda far',  
por alto ŝveba kaj la ordinar'.

En Esperanto ploras nia kor',  
jubilas ĝojo, ridas la humor',  
ĝi ludas lange, fluge levas sin,  
ni tial lernu, fidu, amu ĝin.

# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Esperantigis **Jakovleva Elena**  
[Arĥangelsk, Rusio]

## Kelkaj reguloj por la ĉefoj kaj subuloj

Ĉefo ĉiam pravas.

Ĉefo ne dormas, ĉefo ripozas.

Ĉefo ne ŝatas klaĉojn, ĉefo atente aŭskultas opiniojn de kunlaborantoj.

Kiu venas al ĉefo kun sia opinio, eliras kun opinio de la ĉefo.

Kiu havas opinion la saman kun la ĉefo, tiu rapide faras karieron.

Ĉefo ne mensogas, ĉefo estas diplomato.

Ĉefo ne forgesas ion, li simple preferas ne ŝarĝi sian memoron per troaj informoj.

Ĉefo ne krias, ĉefo argumente esprimas sian vidpunkton.

Ĉefo estas ne obstina, ĉefo estas sinsekva.

Ĉefo ne ŝatas flatulojn, ĉefo dungas lojalajn kunlaborantojn.

Ĉefo ne eraras, ĉefo akceptas riskan decidon.

Ĉefo ne malfruas, ĉefon retenas gravaj aferoj.

Ĉefo ne timas, ĉefo antaŭvidas.

Estimu vian ĉefon, ĉar la alia povus esti eĉ pli malbona.

Trovis kaj esperantigis **Všivceva Tatjana** [Miass, Rusio]

## La ekzameno

Onidire en Jura Akademio de urbeto N. instruis historion al studentoj malgrasa kalva vireto, kiu ne tre atentis, ĉu oni frekventas liajn lekcionojn aŭ ne.

Venis la tago de ekzameno. La instruisto enlasis la studentojn en la lekiĉambron kaj diris:

— Levu la manojn tiuj, kiuj scias mian lernobjekton perfekte.

Tri homoj timeme levis la manojn.

— Alportu viajn poentolibretojn, - ordonis la instruisto kaj enskribis poenton “perfekte” en ĉiujn tri, - vi estas liberaj. Nun levu la manojn tiuj, kiuj scias la studobjekton bone.

Tiam levis la manojn jam 15 studentoj kaj ricevis poenton “bone”. Kiam li demandis, kiu scias historion kontentige, ĉiuj ceteraj ĝoje levis la manojn.

Preskaŭ ĉiuj.

Post kiam “kontentigpoentuloj” foriris, en la lekiĉambro restis 4 studentoj. Dio scias kial ili ne levis la manojn, ĉu ekdormetis, ĉu ne povis kredi je tia “bonŝanco”.


— Nu do, vi scias mian studobjekton malbone, ĉu? – demandis ilin la instruisto. — Domaĝe, tre domaĝe, vi estas devigataj reekzameniĝi.

— Kiam eblas reekzameniĝi? - demandis la restintoj.

— Eblas tuj! Levu la manojn tiuj, kiuj scias...

## Kiom da kapoj – tiom da ĉapoj...

Trovu diferencaĵojn inter du gajaj simietoj



Kolektis kaj esperantigis  
**Burkina Anna** (Ozersk, Rusio)

### Ne ŝovu la nazon...

Viro, proksimiĝinte al knabino, kiu manĝas bombonojn, diras:  
 — Knabino, ĉu vi scias, ke bombonojn manĝi estas malutile?  
 — Sed mia avo vivis ĝis 106 jaroj!  
 — Ĉu li ĉiutage manĝis bombonojn?  
 — Ne, li ne ŝovis sian nazon en aferojn de aliaj!

\*

### Baldaŭ komenciĝos

Baldaŭ oni anoncos pri tio, ke en la proksima estonteco venos tempo komenci prepari sin al antaŭsento de atendado de pli bona vivo.

\*

### Anonco

“Mi helpos al vi maldikiĝi! Donacu al mi viajn tag- kaj vesper-manĝojn!” *Studento Petrov.*

\*

### Reklamo

“Mi estas la unua en la mondo parolanta lavmaŝino “Electrolux”. Se vi havas problemojn pri lavado, mi pretas paroli kun vi pri ili.

\*

### Feliĉulo

— Al mia filino volis edziĝi du viroj: inĝeniero kaj ĵurnalisto.  
 — Kaj al kiu favoris la feliĉo?  
 — Al la inĝeniero. Ŝi elektis la ĵurnaliston.

\*

### La unua

S-ro *Alfredo Nobel* estas registrita kiel la unua inventinto de dinamito, ĉar la antaŭajn oni simple ne povis rekoni.

### Rompita revo

— Kara mia, vi baldaŭ iĝos patro!  
 — Ah! Sed mi revis iĝi kosmonaŭto!

\*

### Ho, ve!

La virino edziniĝas kun espero, ke la viro ŝanĝiĝos, sed li ne ŝanĝiĝas. La viro edziĝas kun espero, ke la virino ne ŝanĝiĝos, sed ŝi ŝanĝiĝas.

\*

### Demando

Kial ni tiom rapide maljuniĝas, se preskaŭ ĉiuj niaj modernaj nutraĵoj enhavas konservilojn?

\*

### Letero de feliĉo

Reskribu “Fundamenton de Esperanto” 30-foje kaj sendu al aliaj esperantistoj, kaj al vi venos feliĉo.

\*

### Malbonŝanca ŝtelisto

Ŝtelisto prirabis bankon. Post lia “vizito” en la banko mankas \$2000000. La direktoro diras al ĵurnalistoj:

— Skribu, ke el la banko oni forŝtelis \$3000000! Tiu aĉulo hejme spertos grandiozan skandalon!

### Tia sorto

Kiam mi estis ordinara oficisto, mi pensis, kia idioto estas nia fakestro. Poste mi mem iĝis la fakestro.

\*

### Ne bedaŭru

Se vi sentas, ke vi komencas stultiĝi, ne bedaŭru – stultiĝi povas nur tiu, kiu estis saĝa!

\*

### Elturniĝis

Staras apude tri vendejoj. La mastro de la liva vendejo pendigis anoncon: “La plej malaltaj prezoj”. La mastro de la dekstra vendejo pendigis alian anoncon: “La plej altkvalitaj varoj”. Kaj la mastro de la tria, pripensinte, pendigis la sekvan anoncon: “La ĉefa enirejo estas ĉi tie”.

\*


**Belousov Igorj** [Engels, Rusio]

### Filozofia demando

Du fiŝetoj en la akvario arde pri io diskutas. Poste unu el la fiŝetoj ĉagrenite fornaĝis en alian angulon. Post ioma pensado la fiŝeto revenas kaj diras:

— Nu, bone, mi konsentas, ke dio ne ekzistas. Sed kiu tiam ŝanĝis la akvon en nia akvario?

Noskova Svetlana [Sneĵinsk, Rusio]



Ekzistas ĉiam aktuala kaj malnova problemoj pri komencantoj — kiel adapti novajn esperantistojn al loka E-kolektivo, kiu jam ekzistas kaj eble delonge funkcias, havas siajn tradiciojn ktp. Komencantoj venas post la fino de elementa kurso, vizitas unu-du kunsidojn kaj poste malaperas. Foje pro tio, ke la laboro de E-klubo ne estas interesa por ili. Sed plej ofte pro tute natura ĝeno kaj sento de nekomforto en nekonata homa kolektivo.

Formoj de la kluba laboro ankaŭ povas esti diversaj. Se ekzemple dum la kluba kunsido elpaŝas iu eĉ tre interesa preleganto, ĉiuj individue aŭskultas lin. Tia formo de laboro estas eble necesa, sed ĝi ne proksimigas kaj ne varmigas homajn rilatojn. Tiel filmspektantoj en kinejo sidas kune (do, kun-sidas), sed ili ne estas unu teamo. Tial tre gravas trovi iujn interhomajn laborformojn, kiuj povas unuigi la homojn. Bona kaj efika rimedo de establo de proksimaj homaj rilatoj, forigo de baroj kaj ĝenoj estas kolektiva agado por atingo de iuj celoj per fortoj de la tuta teamo.

## Uzo de “Ŝnura kurso” por adapti novulojn al E-kolektivo


Tiu ĉi materialo estas kompilita surbaze de koncepto pri “Ŝnura kurso”, prezentita por legantoj de “K” ĵurnalisto de la pedagogia universitato en Jekaterinburg Ŝahnoviĉ I.S. kaj adaptita por laboro de E-kolektivoj.

Por konstrui en kolektivo bonajn homajn rilatojn servas la delonge elaborita kaj vaste praktikata por diversaj kolektivoj (skoltaj taĉmentoj, studgrupoj, militistaj taĉmentoj, kolektivoj de komercaj firmaoj ktp) tiel nomata “Ŝnura kurso”. Iom stranga titolo de tiu metodo venas el tio, ke ĉiuj homoj en teamo aŭ kolektivo laboras kune por atingi komunan celon aŭ rezulton, agas kvazaŭ ili estus ligitaj per unu sama ŝnuro.

Ŝnura kurso povas aspekti kaj kiel instrua programo, kaj kiel evoluiga ludo, kies ĉefa rezulto estas ricevo de sperto pri teama kunagado.

### Bazaj celoj de “Ŝnura kurso”

- plibonigo de etoso en kolektivo, forigo de streĉeco kaj emocia malvigleco
- ricevo de sperto pri konstruiva teama kunagado kaj aparteno al teamo
- plialtigo de efektiveco de enteamo kunagado
- helpi al teamo akcepti novulojn en sian rondon
- plifirmigi kredon je propraj fortoj de la teamo, lerni fidi al ĉiuj teamanoj
- ellabori respondecon pri la komuna rezulto
- motivigi teamanojn al krea pensmaniero ĉe la solvo de aktualaj problemoj
- ellabori ĉe teamanoj kapablon rapide reagi kaj fari decidojn; kutimigi ilin ellabori strategion kune
- helpi al partoprenantoj malkovri siajn kapablojn, altigi korean aktivecon de ĉiu



La sperto montras, ke la ŝnura kurso estas sufiĉe efektiva rimedo por fortigi rilatojn ene de ajna kolektivo, membroj de kiu havas la saman celon, ekzemple, volas disvastigi Esperanton.

Antaŭ ol komenci praktikajn ekzercojn de la ŝnura kurso, oni devas konsideri kelkajn neprajn kondiĉojn:

- grupo, kiu faras ekzercojn, ne devas superi 12 personojn.
- la ekzercojn gvidu homo sperta, kiu konas minimume bazajn elementojn de la ŝnura kurso.
- tempo por preparado de la taskoj ne devas esti limigita
- oni taksu la taskon plenumita nur kondiĉe, ke ĉiu membro de la teamo plenumis ĝin. Se almenaŭ unu teamano ne plenumis la taskon, la tuta grupo revenas al la starta pozicio kaj plenumas la taskon dekomence.

La kurson necesas fari en varma, amika, bondezira atmosfero. Ĉi tie ni

prezentos kelkajn ekzercojn, kiujn oni povus praktiki en siaj lokaj esperanto-klubo, grupoj, societoj kaj aliaj E-kolektivoj. Tiuj ekzercoj havas elementojn de distraj ludoj, tamen la diferenco estas en tio, ke celo de ajna ludo estas gajni, sed celo de la ŝnura kurso estas atingi rezulton dank’ al efektiva streĉo de la tuta kolektivo.

Laboron aŭ funkciadon de ajna kolektivo oni povas kompari kun funkciado de sistemo. Laŭ leĝoj de funkciado de ajna sistemo, utilo pro funkciado de sistemo estas pli granda, ol utilo pro aritmetika sumo de funkciado de ĝiaj elementoj. Tial tre gravas, ke sistemo=kolektivo funkcii sen misoj kaj eraroj, kaj ĉiuj membroj bone kaj respondece faru siajn taskojn.

El tio sekvas nepra kondiĉo de trejnado - se almenaŭ unu persono ne korekte plenumis sian taskon, oni traktas la taskon ne plenumita kaj celon ne atingita, kaj ĉiuj teamanoj devas ripeti la ekzercon denove.

Adaptante tiujn ĝeneralajn kondiĉojn al konkretaj ekzercoj por esperantista kolektivo, oni devas konsideri, ke novuloj kaj komencantoj ne tre lerte posedas la lingvon, tial ne necesas uzi komplikajn lingvajn elementojn. Ja celo de tiuj ekzercoj ne estas praktiki gramatikajn regulojn, sed adapti novajn homojn al la ekzistanta kolektivo, forigi streĉojn kaj ĝenojn inter la homoj.

### Taso kun akvo

La gvidanto plenigas tason ĝis randoj per akvo kaj donas al unu el la teamanoj. Ĉiu devas kun tiu taso atingi iun punkton, ekzemple, starigitan flanke seĝon, kaj reveni, redoninte la tason al alia teamano, kiu faros la saman. Se almenaŭ unu guto elverŝiĝos el la taso ĉe iu el la teamanoj, la tuta teamo revenas al la starta punkto kaj plenumas la taskon denove.

Tiu ekzerco helpas ellabori respondecon pri komuna rezulto >>



## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi havas 41-ja, esperantistiĝis en 1990, miajn poemojn vi povos legi en "Komencanto". Mi volas korespondi kun verkemuloj.

*s-ro Nikolaj Neĉajev*

Markova, 25-76  
Irkutsk, 664528

**Rusio**

necxajev@mail.ru

Mi estas 41 jara komencanto. Int: kulturo kaj psikologio, dez. kor. tm., kun ĉiuj. Mi preferas paper-poŝton.

*s-ro Takase Hidehisa*

1354-15 Oume-shi,  
Takinoue-cyo  
Tokyo, 198-0085

**Japanio**

hidehisa86@hotmail.com

Mi estas 21 jara. Int: lingvoj, alfabetoj, Stephen King, mitologio.

*Durand Gregorio*

30 Avenue Jean Jaurès  
70400 Héricourt

**Francio**

shintasu@orange.fr

Mi estas 17 jara junulo, progresanto. Int: lingvoj, libroj, geamikoj. Mi korespondos ret-kaj paper-poŝte kun gejunuloj.

*Emmanuel Pasco Viel*

35 rue Marivaux - logement 9  
72000 le Mans

**Francio**

emmanuel.pascoviel@neuf.fr

Mi estas fraŭlo, kuiristo. Int: poŝtkartoj, vojaĝi. Mi korespondos ret-poŝte kaj paper-poŝte.

*s-ro Fu Guoqing*

Dianjichang 10 Chejian  
150040

Heilongjiang Harbin

**Ĉinio**

f13045174815@yahoo.com.cn

Mi estas 37 jara edzino, meznivela esperantisto. Mi estas ano de la Usona Mara Armeo. Ŝatokupoj: legi, intermonda komunikado, bildoj kaj desegnoj, lingvoj, historio, filmoj (aparte scienc-fiksio), komputiloj, fotoj, katoj kaj furoj (mi havas du furojn kaj unu katon). Mi serĉas amikojn en Misawa, Japanio, ĉar mi baldaŭ venos tien. Mi volonte sendos al vi kelkajn poŝtkartojn.

*Kathryn PRENTICE*

Norfolko,  
Virginia-Ŝtato,

**Usono**

woodsk@mcfaul.navy.mil

Mi estas komencanta esperantisto, volas korespondi tutmonde.

*s-ro Aeron Glyn Preston*

Rhyd yr Afon, Llandinam,  
Caersws, Powys.

SY17 5NW

Kimrolando,

**Britio**

Agpreston88@aol.com



## Letervesperu en antikva Samarkando

Aŭguste kaj septembre 2006 samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al 15-jariĝo de sendependeco de Respubliko Uzbekistano kaj al 2750-jariĝo de Samarkando, listigita en la registro de la Monda Heredaĵo de UNESKO.

Ni atendas viajn gratulmesaĝojn, kaj, se eble, ĈIUSPECAJN (kaj ĉiulingvajn!) materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekistano kaj Samarkando. Fakte, ĈION AJN pri la temoj, inkluzive fotojn de stratoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos TRE BONVENAJ. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazeto. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio. Anticipan dankon por viaj kontribuoj.

Salutleterojn kaj alispecajn materialojn bonvolu adresi JAM NUN al: Anatoli Ionesov, Direktoro, Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkando, Respubliko Uzbekistano  
Telefona/ fakso: +998 (66) 233 17 53. Retadreso: imps86@yahoo.com  
http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html

### Grupo de 4 lemantoj

Mi estas 18 jara. Mi instruas Esperanton en la liceo Lalande. Miaj lemantoj: Romain, 18 jara viro. Eline, 18 jara virino. Thomas, 21 jara viro. Ni ŝatus korespondi kun alia grupo, sed ni ankaŭ korespondos individue. Skribu al:

*Maxime BERGONSO*

597 avenue de trévoux  
01000 Saint Denis les bourg

**Francio**

max.bergonso@wanadoo.fr  
bergonsom@hotmail.com

Mi estas 20-jara esperanto-komencantino, studentino. Int: rajdi, legi, triki, kobajoj

*Désirée Krausz*

Meisenweg 73,  
71083

Herrenberg

**Germanio**

krausz-herrenberg@t-online.de

Mi estas komencanto, mi volas pliabinigi mian Esperanton!

Int: Libroj kaj muziko

*Dominique VALLET*

8 rue de la Perche –  
BE-7012 Jemappes

Jemappes

**Belgio**

walden@tiscali.be

**komencanto@r66.ru**

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

